**TAGIGO**

ESPERANTO-ASOCIO DE BRASĪLIA

SCS - Edifício Goiãs - s/603

Tel.: 225-4761

Caixa Postal 04-0406

70000 - Brasīlia-DF - BRAZILO

JANUARO 1981

## GRAVA ALVOKO AL KUNLABOREMAJ ESPERANTISTOJ

Esenca faktoro por la sukceso de Universala Kongreso estas la preteco de nombra grupo de volontuloj kunlabori dum la kongresa semajno por la glata disvolviĝo de la diversaj servoj.

LKK Brasília lanĉas alvokon al ĉiuj brazilaj esperantitoj, kiuj jam aliĝis la kongreson, kaj petas la helpon de la lokaj societoj por diskonigi tiun alvokon inter siaj membroj.

### POSTULOJ

Ĉiu membro de la Loka Kongresa Komitato bezonos helpantojn en la diversaj departementoj kaj deziras, ke tiuj homoj ne nur havu facilecon en rapida kompreno, sed ankaŭ ĉarmon en homaj interrilatoj, sufiĉan kapablon konversacii en Esperanto, abnegacion kaj pretecon ensalti por solvi ĉiuspecajn ne-antaŭvideblajn problemojn kaj plenumi eĉ plej modestajn taskojn.

### OFERTOJ

- Ĉiu kunlaboranto preta laŭvice deĵori aŭ resti je dispono de LKK ĉirkaŭ 6 horojn tage dum la kongresa semajno, ricevos poŝmonon en kruzejroj, ekvivalentan al 70,00 guldenoj.
- La loĝado okazos laŭ la kondiĉoj publikigitaj en la revuo "Esperanto" (Decembro/80, paĝo 202)

NI NE DUBAS, ke en tuta Brazilo ekzistas tiuj bonvolemuloj deziremaj kontakti aktive kun la kongresanoj el ĉiuj partoj de la mondo.

La interesitoj bonvolu sin anonci antaŭ la fino de Februaro ĉe:

LKK de la 66-a UK de Esperanto
SCS - Ed. Jockey Club - Sala 103
Caixa Postal 04-0406
70000 - Brasília - DF

Inter la kandidatoj oni selektos minimume 30 personojn al kiuj oni sendos detalajn instrukciojn antaŭ la fino de aprilo.

## LASTE PRI LA UK - LASTE PRI LA UK - LASTE PRI LA UK - LASTE PRI LA UK - LASTE PRI LA UK

Infan-kongreseto - La partopreno estas rezervita por infanoj 6 ĝis 13 jaraj kun eventualaj esceptoj en specialaj kazoj. La infanoj loĝos kaj manĝos ĉe moderna ŝtata infanrestadejo en la centro de Brasília. Apartan inviton ni faras al ĉiuj gepatroj por ke ili aligu siajn gefilojn al tiu unika manifestacio, kiu celas amikeco per aplikado de la komuna lingvo Esperanto. Pliajn detalojn oni povos legi en la Dua Bulteno.

Bankedo - La bankedo okazos ĉe la bordo de Lago Paranoá en la grandaj salonoj de Klubo de Registaraj Oficistoj.
Ĝia menuo ambicias kontentigi la plej postulemajn frandemulojn el la tuta mondo !

Ekskursoj - Krom ĉiutagaj vizitoj de la urbo, estas planitaj tuttagaj ekskursoj al la akvofalo Itiquira, al Cristalina kaj postkongresaj ekskursol al Caldas Novas, rivero Araguaia, Salvador kaj Manaus.

Statistiko - Ĝis la fino de Decembro aliĝis al la kongreso 403 brazilaj esperantistoj laŭ jena geografia distribuo:
Alagoas (2); Bahia (24); Cearã (3); Distrito Federal (38); Espírito Santo (2); Goiãs (11); Minas Gerais (28); Paranã (10); Pernambuco (19); Piauí (1); Rio de Janeiro (121); Rio Grande do Norte (8); Rio Grande do Sul (28); São Paulo (98); Santa Catarina (3); Sergipe (1).

## KONTAKTO KUN SENAC

Oni jam starigis la unuajn kontaktojn kun la estraro de SENAC cele al aranĝo de Esperanto-kursoj por la komercaj kategorioj de la urbo: hotelistoj, vendistoj, turismaj gvidantoj, ktp. Tiuj kursoj okazos en la kadro de nia plano lanĉita en "Tagiĝo" de oktobro 80, por doni al la eksterlandaj kongresanoj videblajn pruvon, ke Esperanto estas populara en nia urbo.

Principe, jam estis decidite, ke serio de intensivaj kursoj, kun faka karaktero, okazos en la sidejo de SENAC dum la venontaj monatoj.

## TEJO

La 37-a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO EN OAXTEPEC (Meksikio) 10-17/07/81

Ĝis la 31a de Marto 81 validos jenaj kotizoj. Ili inkluzivas la partoprenon en la kongresaj aranĝoj, loĝadon, manĝadojn kaj ekskurson:

- ĝis 21 jaroj ...... 240 Gld
- 22-26 jaroj ....... 260 Gld
- pli ol 26 jaroj ... 320 Gld

La individuaj membroj de TEJO, kiuj ricevas la Jarlibron de UEA kaj estas malpli ol 26 jaraj, rajtas ricevi rabaton de 25 Gld. Sendu aliĝon kaj pagon al UEA en Rotterdam.

## ORGANISATION MONDIALE DU TOURISME
## WORLD TOURISM ORGANIZATION
## ORGANIZACION MUNDIAL DEL TURISMO
## ВСЕМИРНАЯ ТУРИСТСКАЯ ОРГАНИЗАЦИЯ
## TURISMA MONDA ORGANIZAĴO

La Monda Turisma Konferenco (Manilo, 27 septembro - 10 oktobro 1980), akceptis rezolucion en kiu aperas jena mencio de Esperanto:

> (La Konferenco) Deziras, ke estu daŭrigataj la penadoj por akceli la formiĝon de turista konscio por plifaciligi kaj kuraĝigi la komunikadon inter vizitantoj, enloĝantoj de la vizitataj lokoj kaj la turisma oficistaro; Substrekas tiurilate la gravecon de la kono de la lingvoj, ĉefe de tiuj kun universala alvokiĝo, kiel Esperanto.

La Deklaracio de Manilo, donas al la laborantoj por Esperanto la moralan aŭtoritaton efike propagandi en turismaj medioj, ekzemple petante la malfermon de kursoj de la internacia lingvo en la lernejoj por turismaj funkciuloj, la eldonon de gvidlibroj, broŝuroj kaj faldfolioj en Esperanto, la utiligon de la internacia lingvo por ĉia informado en turismaj lokoj, ktp.

## NOVAJ INICIATOJ EN BONA ESPERO

Fine de decembro, dum la lernejaj ferioj, Bona Espero "pruntis" sian ravan panoramon por la efektivigo de seminario de la movado "Comunidades Rurais".

La partopreno de pli ol 150 gejunuloj el ĉiuj partoj de Brazilo, kiuj debatis temojn ligitajn al ekologio, naturismo, biologia agrikulturo kaj alternativaj energi-fontoj kaj vivo-stilo, donis unikan eblecon dissemi inter ili la ideon de la internacia lingvo.

Post la seminario, dudeko da tiuj gejunuloj restis en Bona Espero por pristudi la eblecon starigi en tiu regiono komunumon nomitan "Rumo ao Sol". Por ili oni aranĝis intensivan kurson de Esperanto kies rezultoj estis vere entuziasmigaj. Nun Bona Espero reakiris sian trankvilan rutinan aspekton kaj baldaŭ, en la lernejo, eĥos la gajaj voĉoj de la infanoj.

La travivita sperto estis tamen instiga por akcepti la inviton de UEA aliĝi al la festoj de "La Tago de la Tero". Tiucele, oni inaŭguros en Bona Espero sonorilon kiu sonoros unuafoje la 21an de marto por simbole akcenti, ke ni konscias pri la neceso utiligi la naturajn rimedojn, sen detrui la homan medion, kaj kune labori por plibonigi la vivkondiĉojn de la propra kaj estontaj generacioj.

* * * * * * *